

Publius Ovidius Naso,
La metamorfozoj, Antaŭparolo

tradukita de Manfredo Ratislavo

Estas prenita de mi de l' amboso tiu ĉi verko,
mankas pro tio al ĝi, lasta ŝlifado per mi.

Kaj pardonon mi petas anstataŭ laŭdo, leganto,
vi laŭdegas min ja, ne naŭziĝinte per ĝi.

Prenu vi ankaŭ kun tiu la seson da tiuj ĉi versoj,
meti je la komenc' povas vi ilin ja.

Kiu ajn prenos ĉi tiujn senpatrigitajn volumojn,
zorgu, ke en sia urb' estu por ili lok'.

Pensu vi ankaŭ, ke ĝia autor' ne eldonis la verkon,
ke oni ŝiris ĝin kvazaŭ el lia ŝerk'.

Ĉiujn erarojn restintajn en mia verkaro mi estus
ja foriginta, sed ne estis plu ebla al mi.

La unua libro

Diri, ke aliformiĝis la korpoj de l' mondo, mi emas.
Dioj, vi estu favoraj al tiu ĉi mia projekto!
Lasu, ĉar vi ilin ŝanĝis, soni nun tiun ĉi kanton
de la komenco de l' mondo ĝis nia nuntempa epoko.

...

Traduko de la Latina poemo “Metamorphoses, proemium” de PUBLIUS OVIDIUS NASO (-43 – †18) en Esperanton de MANFREDO RATISLAVO (Manfred Retzlaff, Stettiner Str. 16, D-59302 Oelde, Germanio, *1938-11-04) en 1992/2000.*

MR-246-2a / Arg-59-115 (2003-10-26 00:16:57)